



PENSEO

N-ro 304

feb. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



murmurado tranĉas la orelojn

vaneco nutras sin per nulo
kaj la nulo kuŝas sub streketo.
akiri fruktojn arbo volas
sed la trunko fariĝis skeleto.

2013.10.20

scienco

antaŭ kvin milion jaroj
kulo kun sango mortis kaj fariĝis fosilio.
el la sango esploristo
faris nun homon; tiu lin mortigis kiel dio.



2013.10.18

papilia efiko

iu kapdoloras trans terglobo,
cise fajran febron alia suferas,
ili tamen estas neĝemeloj.
poemsuko en la korpoj interferas.



2013.10.18

fatraso

branĉoj plenaj de persikoj
tiklas lagon kun ondlumoj ĉastaj.
mi naĝante fruktojn ŝtelis
sed tuj trovis tiujn ŝelojn plastaj.

2013.10. 6

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Provizore

Mi ŝatas legi poezion surstrande,
malfermante po unu libro ĉiutage,
mi liberigas poemojn,
kiuj tuj flugas en akvon.

Kaj do mi ekrimarkas
la hermetikan nuntempan poetikon,
kiu dekretas la morton
de l' semantika travideblo:

Poezio ne plu ravas,
ĝi elpurigas la ĉiutagan vivon,
disŝirante la evidentajn internaĵojn
de l' metaforoj naivaj.

Leganto estas ĵonglisto,
kiu venkas la lukton
kontraŭ la ruzeco
de l' oblikva "mimesis".

Sed tuj mi eksentas
la urĝon fasoni oceanon
(kiun nun mi vidas!)

fosante l' ondojn
 ĝis trovi la polvon
 de l' dezertoj sangantaj
 sur l' ekranoj de l' TV-oj...

Ĉu poezio do por kio?
 Des pli bone eklerni la kuirarton!
 (Almenaŭ portempe!)

Cabo Frio, 29/12/2016.

Festivaio

La jaro adiaŭas
 Poezion, kiu ferias,
 sed lasis al mi
 iun misteron,
 kiu sufiĉas:

la likvan brilon
 de tiu intensa maro,
 kiun la okuloj
 tute enhavas.

Cabo Frio, 30/12/2016.

Cezar (Germanujo)



Pli da maro

(En memoro pri poemo de Erich Fried)

Finon fine
 al la kramfo, nomata batalo!
 Sobriĝu momenton,
 bojantaj hundoj,
 haltu foje.

Estu unu fojon
 en via vivo
 romantikaj
 kiel juna poetoj:
 vi, aktujoportantoj
 kaj vi, etcerbaj
 distretantoj
 de l' feliĉo,

vi, pelatoj kaj pelantoj,
 kiuj ne plu sentas
 la Teron sub la piedoj.

Iru,
 se eblas,
 iam al la maro!

Al pli da maro,
 kaj poste ĉiam plu tiel!

Erich Fried

Maro

Se oni venas al la maro,
 oni eksilentu
 ĉe la lastaj herbotigoj
 oni perdu la fadenon
 kaj la salan ŝaŭmon
 kaj la akran sibladon de la vento
 enspiru
 kaj elspiru
 kaj denove enspiru.

Se oni aŭdas segi la sablon
 kaj la frotadon de la ŝtonetoj
 en longaj ondoj
 oni finu devi
 kaj ne plu volu voli ion nur maron
 Nur maron

Ankoraŭ dormeme

Mi dormas plu en sonĝ' en plaĝa land',
 sed vekas min kukolo je la vand'.
 Mi kuŝas en hotelo sen furoro.
 En banoĉambro ludas jam muzik',
 jen ĵaz' libera, buntaj sonoj, ŝrik',
 vekigas min trumpet' dum frua horo.

Mi kuŝas do en mola varma lit'.
 Salutas koko korte sen hezit'.
 Mi restas tamen tute sen fervoro.
 En mia kapo bruas moka kant',

ke nia tuta vivo estas vant'.
Aŭskultas mi, forlogas min memoro.

Okulojn miajn frotas mi sen ĝoj',
hieraŭ longdistancis nia voj'.
Mi dormus tre volonte tutan tagon.
Sed ne por dormi estas forpermeso.
Ĉar ni modernas, vivas ni en streso.
Kaj do akceptas streson kiel plagon.

PS: En la supra horloĝo el la ŝvaba Nigra Arbaro estas kukolo, kiu kukuas post ĉiu kvarono de horo. Ni havas tian horloĝon hejme, sed ofte ĝi haltas, se mia edzino aŭ mi forĝesis tiri la ĉenon malsupren. Sed, se ni forĝesis tion, resinkas unu el la abiaj konusoj lante malsupren kaj tiel funkciigas la horloĝon. Kaj la kukuo forlogas nin per sia vokado en la malnovan karan tempon, kiu neniam ekzistis.

Paŭlo Silas (Brazilo)



URĜAS

Urĝas krei en dezerto: venu helpi!
Oni rekte la bovinon suĉu. Melki
Estas tempo-malŝpar' en nuna vivo.
Aŭdu, meze de solec', imperativon,
Kies reeĥ' senfina, mia estas.
Ĉiu iun kaj neniun taŭge estras.
Skurĝas vangon malkapablo stiri barkon
Sur senmovaj surfacaj akvoj. Arkon
Korpo faras enaere. Falas drone.
Levi povas ne plu. Mortis tute. One.

Urĝas krei en dezerto: venu doni!
Vian sangan! Vi! La gantojn tiru do ni.
Senprotekte la manon metu. Fajron
Senti, tuŝi kaj fingrumi. Kaj rond'
Amikeca ĉe mizero, ĉe funebro.
Malaperu, pri kresko, ajna eblo.

Urĝas suĉi l' aluditajn bovin-mamon.
Poste bele plu paradi kiel damo
Elirinta el jarcento forpasinta.

Urĝas urĝe pli profiti el naivo,

El la hom' en monduma fora drivo.

La manikojn suprenfaldu.
La dezir' ekstreme ardu.
Ni atendos tie ĉi bonan rezulton.
Ni konstatos, ĉu funkcias la servuto.



Papos Nascentes (Brazilo)



Ponto al estonto

Sub l' abomena pezo de l' aroganteco
la indulgema ponto jam disfalas
disŝiras en la sama sako
rigidaj preterpasantoj venintaj el dekstro
kaj maldeskstro: tiuj de l' ficentregoj
ekkuregas en la abismon de l' vanteco

La puntaĉo en sia humileco
nur pasigas la leĝeron de lumo
unuope — ĉu ni ĉiuj estas unu? —
la lum-turo de darmo la instruoj de karmo
la paŝo de l' esto en la malvasteco de l' dramo

Rompita koruptita
la ponto al estonto
sin scias abismo

En la puntaĉo de l' humor'
transiras la amo de l' esto
la amo de gapigitaj
preterpasantoj

Ĉiuj pasas. Ĉio pasas.

ĈU IO?

gravurita je necerteco
kaj lumo
plena je imagoj
verkas realaĵojn
ĉiu poemo: poezia
palpebrumo

ĵusa manifestacio
poemo sentempas
ene de Historio:
ebligas vidigon
de Poezio - ĝi mem
ĉu malkio?

Takashi Ito (Japanujo)



vintra silento ...

fluantaj nuboj
super vintra arbaro ...
la mondo svenas

stela brileto
ja pruvo de l' ekzistad' ...
jarfina sojlo

alia mondo
enlumas tra la luno ...
vintra silento

hejmen rapide
ruĝ-lampa procesio
ho! kristonasko

aŭskultu neĝon ...
mallaŭte murmuri al
iu sence



Ivanichka Magharova (Bulgario)



Kvin hajkoj

Olda juglanduj'
Alflugis cikonioj.
L' branĉo sekiĝis.

Vent' kuriozas.
timtremadas la branĉoj.
Ĉevaloj kuras.

Ventego. Branĉoj
La rivero nigriĝis.
La tero spiras.

Staturo levas
oceano. Cunamo
Fajreg' sen fajro.

Acidĉerizbranĉeto
en l' hararo de filin'
Nupta vestaĵo.

el poemaro *Araneaĵo*

Minosun (Ĉinujo)



Iu el Ni

Verkist' Senulo estas fama, al vi plaĉa.
Vi legas stumble liajn verkojn kun admiro,
Kaj tage kaj eĉ nokte; al la teksto saĝa
Kaj brila stilo cedas mense nur la miro.

Dum por vi Ulsen ŝajnas ja fuŝisto vanta.
Li ĉiam lasas ĉie surreteje vortojn
Vulgarajn, kiujn vi atakas ekflamanta;
Koleras vin, ke homoj ŝatas skribotordojn.

Spertulo hele nun lumigas sub kaŝnomo
Al vi, ke Ulsen kaj Senul' – la sama homo.

2017-1-17

Sambo en Preludo

(kantteksto)

Vivo sen vi
ne sencas por mi.
'Stas vi la motiv'
de mia sentiv'.
Jam nia ĝarden'
ne floras ĉar sen
vi malestas lum',
kaj mankas parfum'.

Sen vi jen mi
en ĉi sendirekt'.
Sen varm' de pasi',
ide' sen projekt',
rigard' sen persvad',
ĉi tristokultiv'...
Sen vi mi estas neniu, mankas viv'.

Ne tardu, venu.
Vi komprenu ke neniam mortas la
amo.
Bezon' de flamo
estas en miaj brakoj sen vi,
via brakum' malvarmas sen mi.

Al mi ĉi solo
tenas l' okulojn tristaj sen
alternativ'.
Reen al amo,
Sen vi mi estas neniu, mankas viv'.



Esperantigis



Ŭel Roĝa (Brazilo)

R. Pazzaglia-D. Modugno

MIRINDAĴO

La veron mi diras, ke okazis al mi, nokte, sur
ponto dum mi rigardis l'akvon
kun malbenita emo min ĵeti suben tuj. Subite
alproksimiĝis iu.

Ĉu angelo? Tamen ŝajne nur pasanto
manprenis min dirante tion ĉi:

"Ho mirindaĵo! Kaj kial ne rimarkas vi, ke nia
mondo estas mirindaĵo?"

Ho mirindaĵo! Eĉ la doloro via por vi fariĝi
povos mirindaĵo.

Rigardu ĉirkaŭ vin: amason da donacoj! Oni
inventis por vi la maron!

Ne estas vi malriĉa, posedas vi la sunon, la
vivon, la Amon.

Ho Mirindaĵo! La koro de virino pulsanta nur
por vi, ho mirindaĵo!

La lumo de l'mateno, la helpo de amiko,
l'rideto de infano: mirindaĵo, ho mirindaĵo".

La nokto jam finiĝis kaj mi pli dolĉa sentis la
guston de la vivo:

mirindaĵo, ho mirindaĵo. Ho mirindaĵo, ho
mirindaĵo!



Esperantigo



Emanuele Rovere

(Italujo)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO NAŬA

Ĉevalaj hufoj

§09-01

La ĉevaloj havas hufojn, kiuj povas treti prujnon kaj neĝon, kaj harojn, kiuj povas ŝirmi la korpon kontraŭ la vento kaj la malvarmo. Ili manĝas herbojn kaj trinkas akvon. Ili prancas kaj saltadas. Tio estas la vera naturo de la ĉevaloj. Terasoj kaj ĉambroj, eĉ grandegaj, estas por ili senutilaj.

Iun tagon aperis Bo Le, kiu diris: “Mi bone scias dresi la ĉevalojn.” Li do brulmarkis ilin, tondis al ili la harojn, hufferis, bridis kaj enstalgis ilin, kaj rezulte de tio, du aŭ tri dekonoj de la ĉevaloj mortis. Li faris, ke ili suferu de malsato kaj soifo, devigis ilin trotadi kaj galopadi, trejni kaj disciplinigi ilin. Li ilin turmentis per buŝbridaĵo kaj kaprimeno antaŭe kaj minacis per vipoj kaj rajdvergo malantaŭe, kaj rezulte de tio, pli ol duono el la ĉevaloj mortis.

La potisto diris: “Mi bone scias fari potojn el argilo. Mi uzas cirkelon por fari vazojn ronda kaj ortilon por fari vazojn kvadrataj.” La ĉarpentisto diris: “Mi bone scias prilabori la lignon. Mi uzas kurbilon por fari la partojn kurbaj kaj rektoŝnuron por fari la partojn rektaj.”

Ĉu estas la origina naturo de la argilo kaj de la ligno, kiu sin submetas al la cirkelo kaj la ortilo, al la kurbilo kaj la rektoŝnuro? Kaj

tamen dum generacioj kaj generacioj oni ripetadas la samon: “Bo Le bone scias dresi la ĉevalojn, la potisto bone scias fari potojn, kaj la ĉarpentisto bone scias prilabori la lignon. Tia estas ankaŭ la erara opinio de tiuj, kiuj regas super la mondo.

Laŭ mi tiuj, kiuj regas super la mondo ne devus havi tian opinion. La homoj havas senŝanĝan naturon. Sekvante siajn naturajn instinktojn ili teksas ŝtofon por fari al si vestojn kaj plugas la teron por havigi al si nutraĵojn. Tiu ĉi eco estas komuna al ĉiuj homoj. Ili pensas kaj agas same, havante nenian privilegion, nek partiecon unu al alia. Tio estas nomata ilia “natura libereco”. Tial, en la antikva epoko, kiam regis la perfekta virto, la homoj piediris trankvile kaj memkontente, kun rigardo rekte antaŭen. Tiutempe troviĝis neniam vojoj, nek padoj sur la montoj, kaj troviĝis neniam ŝipoj, nek pontoj sur la akvoj. Ĉiuj estaĵoj multiĝadis kaj vivis tie, kie ili naskiĝis, kaj iliaj vivejoj interligiĝis sen baroj inter si. La birdoj kaj la kvarpieduloj grupiĝis; la herboj kaj arboj abunde kreskis. Sub tiuj cirkonstancoj la birdoj kaj kvarpieduloj povis sin amuzi aŭ libere promeni en kompanio. Oni povis eĉ grimpi ĝis la korvaj nestoj kaj kaŝe enrigardi en ilin.

En tiu epoko, kiam regis la perfekta virto, la homoj kunvivis kun la birdoj kaj kvarpieduloj kaj miksiĝis kiel egaluloj kun ĉiuj estaĵoj en la mondo. Kiel ili tiam povus koni la distingon inter la nobluloj kaj la vulgaruloj? Egale senciaj, ili ne perdis sian virton; egale sendeziraj, ili estis en la natura simpleco kiel nesulptita ligno, kiu tenis sendifekta sian denaskan naturon.

Kiam la saĝuloj venis en la mondon, kiuj persistis en la praktikado de la humaneco kaj la justeco, tiam dubo kaj malfido estiĝis inter la homoj. Ĉar ili ekscese ludigis muzikon, la homoj malvigliĝis; ĉar ili pedante predikadis pri la ritoj, la homoj malkuniĝis en klasojn.

Tial, se la natura ligno ne estas skulptita,

kiel do ĝi povos esti farita en vazojn por oferado? Se la natura blanka jado ne estas rompita, kiel do ĝi povos esti farita en pendjuvelojn? Se la Taŭo kaj la virto ne estas forlasitaj, kial do la homoj devos sekvi la humanecon kaj la justecon? Se la homa denaska naturo ne estas forĵetita, kial do la homoj devos sin turni al la ritoj kaj la muziko? Se la kvin bazaj koloroj ne estas interkonfuzitaj, kial do la homoj devos bezoni buntkolorajn pentraĵojn? Se la kvin bazaj tonoj ne estas interkonfuzitaj, kial do la homoj devos harmoniigi la muzikajn akordojn? Unuvorte, kulpti la lignon en vazojn estas la kulpo de la metiisto, kaj detruo la Taŭon kaj la virton por praktiki la humanecon kaj la justecon estas la krimo de la saĝuloj.

§09-02

La ĉevaloj, kiuj vivas sur la tero, manĝas herbojn kaj trinkas akvon. Kiam ili ĝojas, ili frotas al si la kolon unu kontraŭ la alia. Kiam ili koleras, ili sin returnas kaj hufobatas unu alian. Tio estas nur la instinkto de la ĉevaloj. Sed kiam la ĉevaloj estas jungitaj kaj ornamitaj, la ĉevaloj scias oblikve rigardi en kolero, kurbigi sian kolon, kaŝe rompi sian mordajon kaj peni sin liberigi de sia kondukrimenoj. Tiele la ĉevaloj fariĝis ruzaj kiel ŝtelistoj: jen la kulpo de Bo Le, la fama ĉevaldresisto.

En la tempo de la reĝo Hexu, la homoj pasigis sian vivon en sia loĝejo sen scii tion, kion ili faris. Promenante ekstere, ili iris sen scii, kien ili iris. Ili kontentiĝis tiam, kiam ili havis nutraĵon en la buŝo, kaj ili promenis tiam, kiam ilia ventro satiĝis. Jen ĉio, kion la homoj sciis fari.

Kiam la saĝuloj aperis, kun siaj fabrikitaj ritoj kaj muziko por korekti la homojn kaj kun siaj neatingeblaj humaneco kaj justeco por konsoli ilian koron, tiam la homoj komencis senfine strebi al la scioj kaj ĉasadi la profiton. Ankaŭ tio estas la kulpo de la saĝuloj.

Elĉinigi



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Li nesubigebla

el rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Iu reĝ'
opiniis sin
saĝa kaj multescia
kaj subigis kun obstin'
per ĉuoj sen fin'.

Afiŝis
la demandon li
“Kie troviĝas centro
de l' mondo?” al la naci'
jen por opini'.

Laŭ ordon',
respondos prave
la homo—premiita,
tiu eraros mave—
punita glave.

Multegaj
homoj foriris
post lego de l' afiŝo,
ĉar ĉiuj ja deziris
sed vesupiris.

Afanti
kun sia azen'
nur iris al la palac'

doni la respondon jen
kun memfid-mien'.

“Vi scias
do, ja memfide,
kie troviĝas centro
de l' mond'?” Reĝo mokride
ĉuis acide.

“Jes, via
moŝt', senerare
ĝi kuŝas tie, kie
mia azen' ja stare
sin trovas klare.”

“Ne kredas
mi! Deliras vi!”
la reĝ' replikis pike.
Memdefendis Afanti,
“Tie ĝuste ĝi

situas.
Mezuru vere
vi la tutan mondon, do.
Se malĝuste, severe
punu min infere!”

“Nu, tio...”
zumis voĉbrue
la reĝ' kaj nur post longe
lante demandis plue,
“Respondu due,

kiom da
steloj ĉiele?”
“Ili samnombras kiel
viaj haroj cifere
tutcerte vere.”

La reĝo
koleriĝis nun,
“Sensencaĵo! Trompaĵo!”
“Se eraras jen la sum'
tenu min per pun'!”

Afanti
diris altsone,
“Iru ĉielen, nombru
la stelojn ja persone,
memoru bone!”

“Do... al mi
diru detale,
kiom da haroj estas
sur mia vizaĝ' totale?
Multege sable?”

Trankvile
Afanti per man'
levis sian azenan
voston kun buŝa rikan',
montris al tiran',

“Ha, vidu,
vidu ja klare!
Viaj vangharoj nombras
tiom, kiom, kompare
kaj senerare,

la haroj
de vosto ĝia!”
“Aĥ, kia absurdaĵo!”
Reĝ' fariĝis rabia
kaj malracia.

Li kriis
kaj frapis forte
la tablon kaj insultis,
tordis sin malkomforte
kaj palis morte.

Kun aplomb'
Afanti kun saĝ'
aldonis, “Jen kalkulu
harojn sur via vizaĝ'
ja laŭ via plaĉ',

kaj poste

tiujn sur la vost'
azena tre zorgeme,
vi trovos, je ajna kost'
mi pravas ĝis ost'."



**Sopir-al-sudo* (ĉine: *Yijiangnan*): ĉina fiksfoma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo *xa,xa,a* (*x=senrima*).

Sero (Ĉinujo)

Neĝa pejzaĝo

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Neĝ'
tenas per blanka sieĝ'
la teron
jen sen ajna breĉ'.

Roj'
fermas buŝon kun malĝoj'
ŝajn-morte
kuŝante ĉe l' voj'.

Sur
arboj pendas branĉoj nur
de glaci'
en venta susur'.

Bird'
serĉas grenerojn en bild'
arĝenta
per la beka mild'.

El
herboj kuras en blank-hel'
leporo
panike en gel'.

Bru'
en park' aŭdiĝas ne plu,

nur restas
bril-blanka enu'.

Hom'
sola neĝon antaŭ dom'
balaas
sur blanka gazon'.

Fum'
kuira en hela lum'
spirale
leviĝas jam nun.

Bril'
de l' suno kun malfacil'
penetras
per lanta suspir'.

Mond'
tuta jen en frida ond'
tremetas
al neĝa renkont'.

**Dekses-Silabo*: ĉina fiksfoma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo *a,a,xa* (*x=senrima*)

Adil Olluri



La dezertinto

Avni estis tipo ne scianta facile ĝojiĝi, nek malĝojiĝi, eĉ pro iu parolo, estante unu el la plej prudentaj knaboj inter siaj amikoj. Li ne estis kelkiu tiel multe fortimanta, nek unu el tiuj kiuj orgojlas pro faritaj aŭ nefaritaj bravaĵoj, kiel ja faris multaj el liaj sambatalantoj. Li simple plenumis sian taskon, tiel kiel ordonis liaj superuloj. Tian soldaton aspirus havi al si ĉiu militgvidanto.

Li, dum tiuj du jaroj de la jarcentofino, estis vundita dufoje, eĉ la duan fojon nur gracila linio dividis lin de la morto, ne postlasintajn vivsignojn longajn minutojn. Ĉar

oni apenaŭ rimarkis ke li enspiris, liaj kamaradoj estis findecidintaj entombigi lin la morgaŭon, je altaj honoroj dediĉe al martiro por la libero. Eĉ la brigadestro estis jam kompilinta la omaĝparoladon, glorigante sian batalanton. Kaj en la momenteto kiam ili levis lian korpon por enmeti ĝin en la ĉerkon, okazis la miraklo kaj li ekmovis la manojn kaj eklanĉis tondron da nekompreneblaj vortoj. La soldatojn komence trafis paniko kaj ili rigardadis unu la alian mirmaniere, sed kiam Avni komencis ripetadi siajn viglaĵojn, la vizaĝo de la soldatoj ekridis kaj ili ekgajiĝis, ĉar ilia kamarado estis plu en la sino de la vivuloj.

Post kompleta resaniĝo, ili ariĝis por festi lian resurekton, trinkante kaj kantante ĝis la malfruaj horoj. Por tiu festo ili havis plian motivon fortan, ĉar la aliancanoj estis enirintaj nian landon kaj la serbaj trupoj estis retiriĝantaj. Ili, forirante, tutan tempon tenis la kapon turnita, neniumomente levante la blankan flagon, kiel tion faras kutime ĉiu venkita armeo. Kvankam tiutage estis varmega somera vetero kaj la naturo denove brilis, ankaŭ la suno disigis la fumnebulon, ĉe la fuĝintoj rimarkiĝis pala ombro survizaĝe kaj ili aspektis kvazaŭ frostiĝintaj, mornaj kaj plenaj je kolero.

Estis la deka tago de junio kaj Avni kun la aliaj junuloj faris preparojn por ke kune, marŝante, ili aliru en la pli proksiman urbeton, unu el la plej malgrandaj en nia lando. Kiam ili alproksimiĝis malpli ol ducent metrojn, ili konstatis ke ĝi estis tute ruinigita, postrestis nur ĝia skeleto. Avni rigardadis kompate la detruitan urbeton, vepensante pri tio trafinta tiun lokon. Ĉi tie li pasigis la plej belajn jarojn de sia junaĝo. Li deziris promeni nostalgie en la urbeton, piediri tra ĉiu kvartalo, strato kaj strateto ĝiaj, rememori unu post unu la neforgeseblan tempon pasigitan en ĝi, kie li malĉeestis lastajn du jarojn.

Tial, kiam li starigis sian deziron al sia superulo por ĉirkaŭviziti tiun malgrandan lokon, la superulo sciigis al li novaĵon ne tiel agrablan en tiu momento, ke la urbeton ankoraŭ ne estas tute liberigita, pro tio oni devas esti atentema, ĉar ankoraŭ ekzistas etaj grupoj ne eskapintaj, cirkulantaj kvazaŭ senkapaj kokinoj tra la kvartaloj de la lokaj serboj, senuniforme, sed armitaj, por defendi la ŝtaton, kiu ne kunprenis ilin kiam ili forkuris, sed nur instigis ilin pludefendi ĉi-landon, dirante ke ĝi estas ilia kaj de neniu alia.

— Hieraŭ mi sciigis de certaj fontoj ke ili kunvenis ĉe domo de Dragutin Spasojeviĉ aŭ ie apude — informis konvinkite siajn subulojn la gvidanto de tiu marŝtrupo, ke krom la celon por ĝisliberigi la urbeton, oni intencis ankaŭ la starigon de la nova ŝtatpotenco sur ĝi.

Avni, ĵus aŭdinte la familian nomon Spasojeviĉ, tutkorpe embarasiĝis kaj eksentis tremon de kapo ĝis la piedoj, ĉar kun tiu familio je tia nomo li havis parencecon, kion li ne estis sciiginta al iu ajn. Tiun ŝanĝiĝon de lia mieno apenaŭ rimarkis iu el 47 marŝantoj, venkeme enirantaj en la urbon, kiuj malgraŭ siaj laceco kaj elĉerpiteco, nerazitaj kaj nelavitaj, eniris tiel solene kaj ceremonie, kiel tion indus nur venkintoj.

— Hodiaŭ posttagmeze, pli precize je la kvara horo, ni devas sieĝi Spasojeviĉojn kaj tutan ilian kvartalon. Ni devas senarmigi kaj aresti tiujn banditojn — decideme ordonis la ĉefmarŝanto kaj ĉiuj aprobis tion, helpante la ĉefon per ideoj por ĝiskompili la sieĝplanon de la domo per detaloj, kies sukcesplena plenumiĝo, signifos kompletan saviĝon de la urbeton. Nur unu el la marŝantoj silentis, staris enpensiĝinta, ir-reiris de unu loko al alia, sed ankaŭ nun la venkintoj ne rimarkis la signojn montrantaj ke ĉe Avni rompiĝis la ekvilibro.

Li senĉese pensis pri Vesna, la sola filino de Spasojeviĉoj, kiu estis lia unua amo dum la

mezlernejaj jaroj, tamen ne nur la unua, sed ankaŭ la sola, ĉar post fino de la studoj en la mezlernejo la milito komenciĝis kaj li estis enviciĝinta ĉe sojlodefendantoj. Vesna, blondulino kurthara, estis samaĝa kiel Avni. Ino tre altstatura por sia aĝo, kutime vestita per malvastaj ĝinzoj, distingantaj la korpoliniojn kaj lasantaj senmense la albanan junulon.

Ili renkontiĝis apud la ortodoksa preĝejo de la urbeto. Proksime estis kampo kiun la junuloj transformis en malgrandan futbalejon, kie, pro manko de kolonoj, la golpordoj anstataŭiĝis foje per ŝtonoj, foje per librotekoj. Avni, almenaŭ dufoje semajne rigardadis ĉi tiun knabinon apud la preĝejo. Estis li korinklinema al ŝi, ĝis tia grado ke neniu alia knabino interesis lin. Sed lia embaraso estis nescii la serban, tiel li ne scipovis kiel esprimi sian amon al ŝi kaj estingi sian suferajon.

Tio daŭris ĝis kiam la instruisto de la albana lingvo, Kujtim Kastrati, relative junaĝa, helpis lin skribi amleteron, kiun Avni ankoraŭ parkeris vortvorte:

“Volim te. Mnogo te volim. Bez tebe moj život ništa ne vredi. Poljubi me samo jednom, ja ĉu zauvek biti tvoj”¹

Avni finfine kuraĝis alfronti la knabinon, ĉar nun li disponis pri certeco kaj rimedo per kiu li povas komunikiĝi. Vesna, tiutage, hastis por hejmeniri, ĉar estis pluvnuboj en la ĉielo kaj de momenteto al momenteto oni atendis pluvon, kiam surprize kaj neatendite, li trafis ŝin kaj elvolvis la leteron kaj etendis ĝin al Vesna, leteron kies vortoj estis horizontale vicigitaj kaj skribitaj per krajono *Marker* kaj ruĝkoloraj grandaj literoj. Vesna komence ekridegis pro tiu ago de la junulo, korvohara, nigraokula kaj korp-evoluinta.

Ŝi ne ridis tiom pro la skribitaj vortoj kiom pro la fakto ke la albana junulo ne scipovis

diri ion pli ol tiuj vortoj en la letero. Li simple estis konfuzita, ne sciante kion fari, eĉ unufoje li ekpensis ke la instruisto estis skribinta ion, kio igis lin kvazaŭ klaŭnon antaŭ ŝi, senigante lin de ajna ebleco por ame ekrilati kun la bela Vesna. Sed, post kelkaj tagoj, ŝi mem alproksimiĝis al Avni, ĉar ŝi konsideris lian akompanion ege amuza. Ŝi ĉiutage lernigis al li novan serban vorton.

Ĉi kozojn li rememoris tiun tagon de la deka de junio, neniam forgesante la unuan kison kun Vesna malantaŭ la preĝeja muro, same la unuan amoron kun ŝi en la eta monto ĉepiede de la urbeto. Li rememoris Vesnan iranta, vestita per ĉielkoloraj kaj nigraj ĝinzoj, rememoris sian nudan korpon, siajn malgrandajn mamojn, la solajn kiujn li estas vidintaj iafaje. Soliĝinte kun ĉi tiuj pensoj, li sentis sin povrulo, hontema, ĉar li devis partopreni en la agado de la atako kontraŭ la domon de sia sola amantino. En tiuj momentetoj li ekmalamis sin, ankaŭ la uniformon, kiun li portis surkorpe, kiun li plenvole survestis, ĉar la serbaj policistoj estis mortigintaj sian onklon, al kiu li rilatis pli forte ol al sia patro.

Alvenis la kvara horo kaj la domo de Spasojeviĉo sieĝatis. Ŝtormo da kugloj estis alĵetataj sur ĝin kaj sur ĝiajn murojn kiuj plentrukiĝis pro ili. La rezistado de la familianoj kaj kvartalaj viroj, enfermitaj en la domo, daŭris nur duonhoron, kaj ili unu post la alia enmaniĝis ĉiuj, komencante de Dragutin, liaj filoj, najbaroj kaj laste de lia sola filino, bela Vesna. Vidinte ŝin, Avni eksentis dolorigan kaj senkonscian angoron, alproksimiĝis al la unua vico de soldatoj, ĝuste al ties gvidanto, Ahmet, nur por vidi Vesnan pli apude kaj pli klare. Ankaŭ Vesna vidis lin kaj alrigardis rekte al liaj okuloj, sed ĉi tiu neniam komprenis ĉu tiu rigardo esprimis amon aŭ malamon en tiuj momentetoj de kaptiteco.

Li sentis sin tre emociigita kaj hontigita samtempe. Vesna en lia okuloj estis la sama, lia adoratino, kaj li faros ĉion por ankoraŭfoje aŭskulti ŝian ridon. Estis la sama, belulino, flirtulino, kvankam la timo estis paliginta iomete la brilon.

— Euu, bona vagino do estas, freŝfreŝa ŝkina² — sin esprimis Ahmet, kio deekstere ŝajnis kiel hazarda humoro, igante la ceterajn soldatojn ekridi, sed en lia interno, li esprimis volupton al Vesna, kies korpon li senvestigis pense kaj okule.

— Jam alvenis la tago por venĝi por ĉiuj niaj fratinoj seksperfortitaj de ĉi tiuj fiuloj — aldonis li decideme, klarigante al la soldatoj ke tiu knabino apartenas al li mem, estis ja lia ĉasaĵo.

— Tiun knabinon neblas tuŝi eĉ per la fingreto — tuj reagis kiel neniam antaŭe la plej juna soldato inter ili.

— Kion vi diras, do?! — alparolis Ahmet malestime al Avni.

— Oni neniam povas tuŝi ŝin. Estas la mia — diris Avni per mallaŭta voĉo. Tiel decidema li ŝajnis, kiel ankaŭ ruĝiĝinta pro honto, kio igis la komandanton ekridi, same la soldatojn proksime al ili.

— Ne gravas, mi lasos ŝin ankaŭ al vi, iafoje — diris Ahmet, kvazaŭ dezirante konsoli al sia subulo, kiu, post ĉi tiuj vortoj, ne plu toleris sed aldirektis sian kalaŝnikovon al sia superulo, surmetante la tubon de la malnova sovetia armilo sur la brusto de Ahmet.

— Neniu kuraĝu ektuŝi ĉi tiun virinon, antaŭ ol piedpremi mian mortontan korpon, — severe minacis Avni, ankoraŭ pli skuiĝanta, vidinte Vesnan ekplori. Ŝi certe estis kompreninta ke ĉi tiun memoferon li estis faranta por ŝi kaj nur por ŝi, sed pro timo, tiel de la soldatoj sieĝantaj, kiel pro siaj kruelaj familianoj, ne kuraĝis alvoki lin laŭnome.

— Tia masklo estas ja vi?! Pro ŝkina vi volas mortigi vian komandanton, ĉu?! Ptu, mi fiku merdan dezertinton — kaj post ĉi tiuj vortoj de ilia gvidanto, ĉiuj soldatoj kvazaŭ histeria ĥoro, komencis ofendi Avni-n, nomante lin dezertinto, unu post la alia.

Dum ili pafis per ofendaj vortosagoj al la povra junulo, kiu neniumomente demetis la malvarman tubon de la armilo tuŝanta la bruston de sia komandanto, grupo de dekoj da fremdaj soldatoj, parolintaj foje malbonan anglan kaj foje apartan lingvon, akompanate de bruado de tanko kaj aliaj militveturiloj, eniris la pordojn de la domo de Spasojeviĉoj. Enesperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

notoj:

1. *"Mi amas vin. Mi ege amas vin. Sen vi mia vivo nenion valoras. Donu min nur unu kison kaj mi estos la via poreterne."*
2. *Mokvorto por serboj fare de albanoj*



Eldonas Redakcio de *Penseo*
 Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
 Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
 de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
 Chongqing, 400023, Ĉinio
 Tel: (023) 67095890 (hejme)
 Retadreso: vejdo@163.com
 Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.
 Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin
 turnu al www.elperno.cn/penlisto.htm

